

Ulrich Lins

La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo



Esperanto-dokumentoj priskribas la laboron, organizon, kulturon kaj historion de la Esperanto-movado. Ili aperas en Esperanto kaj en la angla kaj franca lingvoj. La enhavo de la diversaj serioj ne estas identa.

Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko estas permesita, kondiĉe ke la fonto estu indikita.

La dokumentoj estas aboneblaj ĉe la landaj kotizperantoj de UEA aŭ rekte ĉe la eldonejo: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Abono validas ne por difinita periodo sed por fiksita nombro de dokumentoj. La abonprezo de €24,00 ampleksas 10 dokumentojn en unu serio (Esperanta, franca aŭ angla).

La prezo de unuopa dokumento estas €2,15. Ekde tri ekzempleroj de sama dokumento unu ekzemplero kostas €1,45. Por grandaj kvantoj oni povas peti de UEA oferton pri aparte favora prezo. Al la prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме €2,25) kaj por klientoj en Eŭropa Unio 6% por la enlanda imposto.

**LA LABORO DE
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
POR PLI PACA MONDO**

Ulrich Lins

**1. LA SINTENO DE LA ESPERANTO-MOVADO AL LA
PROBLEMOJ DE PACO KAJ INTERPOPOLA KOMPRENIĜO**

La celoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas, laŭ ĝia Statuto:

- (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
- (b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- (c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- (ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

La agadoj kaj atingoj konformaj kun la unua celo – en pli malvasta senco, la varbado por Esperanto – restas en la ĉi-sekva superrigardo grandparte ekster konsidero. Anstataŭe, ni limigas nin al specifa aspekto de la agado de UEA, kiu akordas kun la dua celo, nome al la kontribuo de la Esperanto-movado por la akcelo de la monda paco kaj por la interproksimigo de la popoloj. Per tio ni deziras montri, ke, unue, Esperanto – kvankam ankoraŭ ne oficiale akceptita kiel dua lingvo de ĉiu homo por uzo en internacia komunikado – jam delonge estas lingvo plene funkcipova kaj kapabla je praktikaj atingoj, ĝuste ankaŭ sur kampo aparte grave en la nuna monda situacio, kaj ke, due, la laboro por disvastigo de Esperanto, kiun nun ĉefe gvidas UEA, per si mem estas nedisigeble ligita kun la strebo al paco kaj internacia kunlaboro.

La ideo de interŝtata paco kaj de interhoma solidareco akompanas Esperanton ekde ĝia naskiĝo. Kiam la juda okulkuracisto Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917) publikigis en Varsovio en 1887 la unuan lernolibron de sia “lingvo internacia”, li vidis en tio provon realigi revon de sia junaĝo. En Bialystok, la naskiĝurbo de Zamenhof, kunvivis judoj, poloj, rusoj, kaj germanoj, kies

reciproka malamikeco forte turmentis la infanan animon. Zamenhof poste memoris: “En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa, kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj.” Pro tio, skribis Zamenhof, li decidiĝis, ke “kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon”.

Al la konvinko, ke Esperanto povus servi al la forigo de la malbono de diverslingveco kaj tiel kontribui al interfratiĝo de la homaro, ŝuldiĝis la rapida kaj granda resonado, kiun la lingvo trovis unue inter rusoj, poste inter germanoj kaj francoj kaj iom post iom ankaŭ en aliaj mondpartoj. La idealisma impulso de Zamenhof helpis, aldone al la lingva esprimovo de Esperanto, levi la lingvon en surprize mallonga tempo al pozicio, kiun aliaj projektoj de artefarita lingvo ne atingis, nome al la rango de vivanta lingvo.

La emocia potenco, kiun entenis la kredo pri popolinterfratiga misio de Esperanto, kaŭzis, ke reflektado pri la utopiaj elementoj en la pensado de Zamenhof komence ne okazis. Ĝi estis subordigita konsidere al la fakto, ke Esperanto tuj kontentigis la bezonon de kreskanta kolektivo je komunikado kaj ke ĝi – kiom ajn malproksima ŝajnis la celo de frata homaro – dekomence montriĝis utila ankaŭ por praktikaj celoj. En epoko, kiam la sento pri internacia solidareco estis ankoraŭ subevoluinta, kiam regis la konkuro de imperiismaj potencoj kaj kiam estis faritaj nur modestaj provoj ellabori regulojn por arbitracia solvado de interŝtataj konfliktoj, tute ne estis mirige, ke la adeptoj de Esperanto emis iom trotaksi la interpacigan rolon de sia lingvo, vidante esprimita en ĝi la sopiron de la homaro al unueco.

Tamen, malgraŭ la – de ekstere rigardate – troa priatento de la *lingvaj* radikoj de internacia malpaco, ne forestis kompreno pri tio, ke por ebligi pacan kunvivadon de la homoj necesas fari pli, ol venki la lingvan diversecon. Zamenhof mem konsciis, ke neŭtrala, supernacia lingvo ne sufiĉas por interproksimigi la popolojn. En sia junaĝo li aktivis en la cionisma movado, sed poste li decidis alpaŝi solvon de la problemo de rasa diskriminacio (kiu instigis lin al tiu aktivado) en pli larĝa skalo. Grandan parton de sia energio li dediĉis al la difinado de “neŭtrale-homa religio”, kiu transcendu ĉiujn rasajn kaj religiajn barojn, alvokante la homojn senti sin unuavice anoj de la homaro kaj nur duavice membroj de iu nacio aŭ adeptoj de religia kredo. En *Deklaracio pri homaranismo* (1913) Zamenhof definitive formulis siajn gvidprincipojn – kondamnon de nacia orgojlo kaj religia hipokriteco kaj pledon por obo al baza universale valida etika regularo. Eĉ inter la esperantistoj Zamenhof ne estis tre sukcesa en la varbado por siaj ideoj. Sed oni povas vidi en la nuna ekumenisma pensado kaj la pliintensiĝanta interreligia kunlaborado malfruan partan efektiviĝon de liaj revoj.

La unuaj rusaj esperantistoj fervore kontribuis al la disvastigo de la ideoj de Lev Tolstoj, kies pledon por perreligia reformo de la socio kaj por senperforta rezisto kontraŭ la cara reĝimo ili trovis facile harmoniigebla kun la popol-interfratiga celado de Zamenhof. Aliflanke, la ekstrema idealismo de la Esperanto-pioniroj en la aŭtokrata Ruslando ne estis samgrade akceptebla por homoj en okcidenta Eŭropo. Kiam Esperanto komencis gajni terenon ankaŭ tie, la gvidon de la movado transprenis francaj intelektuloj, kiuj atendis de Esperanto praktikan utilon por la internaciaj rilatoj en la kapitalisma epoko. Kvankam ankaŭ ili en sia plimulto tendencis al pacifismo, la speciala homfratiga retoriko, kiun uzis la rusaj esperantistoj sur la fono de la intergenta malamo en Ruslando, estis al ili fremda. Precipe la sinkretismajn ideojn de Zamenhof ili konsideris ĝenaj por la plua disvastigo de Esperanto en la progresinta okcidento. Sub la influo de la francaj gvidantoj, dum la Unua Kongreso de esperantistoj en Boulogne-sur-Mer (1905) estis akceptita Deklaracio, kiu nomis esperantisto ĉiun personon, “kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas”, kaj deklaris la oficialan Esperanto-movadon nerespondeca pri “ideo aŭ espero”, kiun individua persono ligas kun Esperanto.

Kvankam tiu Deklaracio do teorie sankcias la uzon de Esperanto por kiu ajn celo, eĉ por tute ne “pacakcela”, la granda plimulto de la esperantistoj tamen ĉiam opiniis, ke Esperanto estas pli ol nur lingvo – ke, kontraŭe, ĝi samtempe simbolas la naturan aspiron de la homaro al paco. Tian komprenon pri “interna ideo” de Esperanto precipe Zamenhof tenis vivanta, rifuzante limigi la aplikon de la lingvo al nuraj komercaj bezonoj; li postulis en sia inaŭgura parolado dum la Kongreso en Cambridge (1907): “... ĉio, kio, neniun ofendante, povas krei pacan *ponton* inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj kongresoj, sed kontraŭe ĝi devas esti ĝuste la *esenco* de niaj kongresoj...”

Efektive, jam en la unua jardeko de la nova jarcento ekzistis ampleksa pacifisma literaturo en Esperanto, kiu analizis la ekonomiajn kaj sociajn radikojn de la tutmonda malpaco kaj pledis por la perinstitucia garantiado de la paco. Ekde 1905 aperis la revuo *Espero Pacifista*. Konataj pacifistoj estis inter la unuaj aŭtoroj de Esperanto-lernolibroj por siaj samnacionoj, kiel la slovako Albert Škarvan kaj la aŭstro Alfred Hermann Fried, la Nobelpremiito de 1911, aŭ ludis gravan rolon en la sialanda Esperanto-movado, kiel la brito Felix Moscheles kaj la germano Georg Arnhold, unu el la ĉefaj mecenatoj de la pacifista movado antaŭ la Unua Mondmilito. Al la unuaj esperantistoj en Francio apartenis Gaston Moch, aktivulo en la Dreyfus-ana “Ligo por la Homaj Rajtoj”, kiu en 1894 estis ekŝiĝinta el la armeo por dediĉi sin de tiam al la batalo por paco kaj demokratio. La romano de Bertha von Suttner, *For la batalilojn!*, aperis en Esperanta traduko (1914).

Restis tamen kontraŭdiro inter la koncepto pri lingvo servanta ĉiajn celojn (laŭ la Deklaracio de Boulogne) kaj la postulo de Zamenhof, ke per Esperanto necesas unuavice “kulturi la flamon de homara sindono kaj espero”. Sukcesa provo se ne solvi, almenaŭ mildigi tiun kontraŭdiron estis la fondo de Universala Esperanto-Asocio en 1908. Fondita de la juna sviso Hector Hodler, UEA ĝis hodiaŭ restas la reprezenta organizaĵo de la Esperanto-movado. Ĝi ofertis, unuflanke, per starigo de tutmonda delegita reto al la membroj siajn servojn por la uzo de Esperanto por plej diversaj celoj kaj en tiu senco pligrandigis la praktikan utilon de la lingvo; aliflanke, ĝi transprenis – en pli realisma formo – la originan idealismon de Zamenhof, difinante la “esperantismon” kiel “praktikan internaciismon”, kiu celas ne nur plifaciligi la rilatojn inter la *nacioj*, sed esti avangardo en nova, pozitiva fazo de internaciismo. Hodler emfazis, ke ne eblas konsideri la mondlingvan problemon sendepende de aliaj sociaj problemoj; li nomis la esperantismon “precipe socia, konstrua kaj progresema movado”, kiu klopodu kunigi *homojn* sendepende de iliaj nacieca, lingva kaj rasa apartenoj. La sorton de Esperanto Hodler vidis “intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia” kaj tial postulis de la membroj de UEA aktivan lukton kontraŭ la “interŝtata anarkio”.

La fondo de UEA kondukis al pli profunda kompreno de la Esperantomovado pri la kompleksaj radikoj de la internacia malpaco kaj pri la politikaj rimedoj necesaj por kontraŭbatali ĝin. En la organo de UEA jam dum la Unua Mondmilito aperis vojomontraĵaj artikoloj, en kiuj oni alvokis al enkonduko de novaj juraj reguloj en la interŝtataj rilatoj kaj en kiuj kiel ĉefaj principoj de la postmilita rekonstruo estis nomataj “nacia libereco, demokratia rego, internacia ŝtatligo”. Aldone al tio, Hodler klarvide atentigis, ke “vivpova estos tiu Ligo de Nacioj nur, se ĝi kunigas ne sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe popolojn per spirito de reciproka kompreno”. Pri la temo de postmilita pac-ordo Hodler verkis regule ankaŭ en la svisaj periodaĵoj *Les Documents du Progrès* kaj *La Voix de l'Humanité*. Ampleksa franclingva studo restis nelondonita, ĉar Hodler frue forpasis, en 1920.

Simile, ankaŭ Zamenhof en siaj lastaj vivojaroj akiris pli realisman komprenon pri la efektivigeblo de siaj altaj idealoj, koncentrante sin al aktualaj, urĝe alfrontendaj taskoj: En memorando al la Kongreso de Rasoj en Londono (1913) li akcentis la neceson de interrasa toleremo kiel antaŭkondico por la malebligo de internaciaj konfliktoj, kaj en “Alvoko al la diplomatoj” (1915) li ne nur argumentis por la plena memdecidrajto de la nacioj kaj la certigo de la plenaj demokratiaj rajtoj de la civitanoj interne de tiuj nacioj, sed ankaŭ proponis starigi Tuteŭropan Tribunalon, kiu decidu pri la reguligado de konfliktoj. Por pli fora estonteco Zamenhof antaŭvidis la kreon de Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo.

Post la fondigo de Ligo de Nacioj, la organo de UEA aperigis multajn artikolojn apoge al ties celoj kaj agadoj. Tiuj alvokoj venis ĉefe el la plumo de Edmond Privat, redaktoro de la organo kaj de 1924 ĝis 1928 prezidanto de UEA, kiu verkis ankaŭ librojn similtendencajn en Esperanto, ekz. *Interpopola konduto* (1935); Privat, amiko de Mahatma Gandhi kaj Romain Rolland, ĝuis ekster la Esperanto-movado altan reputacion kiel publicista pledanto por la sendependiĝo de Pollando kaj Hindio. Siaflanke, ankaŭ Ligo de Nacioj rekonis la potencialojn de la Esperanto-movado. Ĝia asista ĝenerala sekretario Inazô Nitobe nomis Esperanton “motoro de internacia demokratio”, kaj oficiala raporto de Ligo de Nacioj pri *Esperanto kiel internacia helpa lingvo* (1922) konklude konstatis:

Lingvo estas potenca forto, kaj la Ligo de Nacioj havas ĉian kaŭzon por observi kun aparta intereso la progreson de la Esperanto-movado, kiu, se ĝi fariĝos pli disvastiĝinta, povos iam konduki al grandaj rezultoj el la vidpunkto de morala unueco de la mondo.

Tiajn atendojn nutris la fakto, ke en la 1920aj jaroj dekmiloj da homoj lernis Esperanton. La lingvo ebligis al tiuj homoj ne nur la rektan interŝanĝon de pensoj kun diversnacionoj super la lingvaj baroj, sed ankaŭ ligiĝis kun esperoj je pli justa socia ordo, kiel tio estis aparte rimarkebla inter laboristoj. En 1921 estis fondita speciala organizaĵo, Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu dediĉis sin al la internacia edukado de la proletaro per Esperanto; ĝia ĉiusemajna revuo *Sennacialeto*, en kiu ordinaraĵoj el ĉiuj mondopartoj senafekte rakontis pri siaj vivkondiĉoj kaj personaj zorgoj kaj plezuroj, havis gravan multobligan efikon, ĉar el ĝia enhavo ĉerpis centoj da nacilingvaj gazetoj. Kongresoj, multnombra literaturo, la instruado de Esperanto en lernejoj de pluraj landoj, amaskursoj por laboristoj – ĉio ĉi dokumentis la grandan popularecon de la lingvo kaj same de la per ĝi esprimitaj tendencoj al internaciismo en la 20aj kaj fruaj 30aj jaroj.

La evoluo okazis grandparte ekster Universala Esperanto-Asocio, kiu devis observi pli singardan, politike neŭtralan pozicion. Ĝiaj membroj kiel individuoj tamen neniam sentis sin devigitaj kaŝi personajn konvinkojn, kaj tiuj estis en tiu aŭ alia formo unuavice direktitaj al la laboro por paco. Dependis de tiuj individuoj kiel konkretigi tiun laboron. Ne estas mirige, ke en 1929 aperis Esperanta traduko de la kontraŭmilita romano de Erich Maria Remarque, *En okcidento nenio nova*. Al la multaj postmilitaj iniciatoj apartenis ankaŭ la kreo de Internacio Katolika, kiu klopodis kunigi katolikismon kaj pacifismon kaj uzis Esperanton. Ĝia fondinto Max Josef Metzger pli malfrue estis ekzekutita de la nazia reĝimo.

Kun la antaŭenmarŝo de faŝismo ankaŭ la Esperanto-movado devis suferi grandajn batojn. En 1936 Hitlera Germanio malpermesis la pluan disvastigon

de la lingvo, kiun la nazioj rigardis “lingvo de komunistoj” kaj krom tio proksime ligita kun “judaj popolinterfratigaj iluzioj”. Nur unu-du jarojn poste ankaŭ en Soveta Unio la Esperanto-unuigo estis disbatita kiel “internacia spiona organizaĵo”; la tre vigla internacia korespondado, per kiu la sovetaj esperantistoj tenis kontakton kun la cetera mondo, estis perforte haltigita. En tiuj persekutoj miloj da esperantistoj pereis; ankaŭ anoj de la familio Zamenhof estis viktimoj de la nazia teroro en Pollando.

Tamen estas multaj ekzemploj, kiuj montras, ke dum la milito esperantistoj plue uzis sian lingvon kaj eĉ ke Esperanto povis alporti helpon. En la koncentrejoj Dachau kaj Stutthof malliberigitaj esperantistoj organizis kursojn de Esperanto por siaj samsortanoj. En Nederlando, Danlando, Pollando k.a. esperantistoj riskante sian vivon kaŝis judojn. Ankaŭ troviĝas kortuŝaj epizodoj pri tio, ke esperantistoj en kriza situacio povis elsaviĝi, ĉar la kontraŭula soldato hazarde malkovriĝis samlingvano.

Post la Dua Mondmilito, dum kiu la aktivado por Esperanto preskaŭ estingiĝis, UEA estis restarigita. UEA troviĝis inter la unuaj internaciaj organizaĵoj, kiuj proklamis sian akordiĝon kun la celoj de Unuiĝintaj Nacioj: Jam meze de 1947, proksimume unu jaron kaj duonon antaŭ la akceptiĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (10a de decembro 1948), la Asocio aldonis al sia Statuto alineon, laŭ kiu “la respekto de la homrajtoj estas por ĝia [de UEA] laboro esenca kondiĉo”. Per tio UEA klare elstarigis, ke ĝia neŭtraleco en rilato al politiko, raso kaj religio ĉesas tie, kie okazas malobservoj de la fundamentaj homaj rajtoj kaj minacas tendencoj malamikaj al la evoluo de paco kaj internacia kunlaboro.

Konsekvence, en sia agado en la ekstera mondo UEA, kiu ekde 1954 havas oficialajn rilatojn kun Unesko, apogas ĉiujn tendencojn, kiuj fortikigas la observadon de la homaj rajtoj kaj la plibonigon de la rilatoj inter la nacioj. Al ĝiaj agadoj apartenas la partopreno en kampanjoj celantaj al kreo de pli paca kaj solidareca mondo, ekz. la Jaroj kaj Jardekoj proklamitaj de UN. Per tio UEA demonstras sian ligitecon al la Ĉarto de UN kaj aliaj internaciaj iniciatoj. Samtempe, la specifa profilo de UEA ĉiam restas gardata en tiuj aktivadoj: Per sia batalo kontraŭ lingva diskriminacio – unu formo de malobservo de la fundamentaj homaj rajtoj – kaj per sia pledo por plifaciligado de la interhoma komunikado kiel nerezignebla antaŭkondiĉo por efektiva paco kaj interkompreniĝo la Asocio ĝuste celas turni la atenton de la publika opinio al problemaro, kiu restas neglektata en interŝtataj konferencoj kaj kiu ĝis nun ne okupis merititan lokon en la konscio de la monda publiko. Temas esence pri tio ĉi, kiel formulita de la multjara prezidanto de UEA, Ivo Lapenna: “... malmulto estis kaj estas farata por interkompreniĝo sur nivelo plej malalta, sed plej grava, la nivelo de la ordinaraĵoj homoj.... Ĉiam temas kaj temas nur pri la kunezistado

de la ŝtatoj kaj multe malpli, aŭ eĉ neniom, pri la amika, paca kunvivado de la popoloj, de la ordinaraj homoj.” Informi la eksteran rondon pri ĝia postrestado rilate solvon de tiu ĉi aspekto de internacia kunlaboro kaj persiste daŭrigi siajn proprajn kontribuojn sur tiu kampo, restas la ĉefa tasko de UEA en la estonteco.

2. LA PRAKTIKA AGADO PER ESPERANTO POR PACO KAJ INTERKOMPRENIGŔO: KELKAJ EKZEMPLOJ

2.1 Helpagado dum la militoj

Kiam eksplodis la Unua Mondmilito, Universala Esperanto-Asocio ofertis al la ĝenerala publiko siajn servojn por helpi al tiuj personoj, kiuj restadis en eksterlando kaj pro la militagoj estis malhelpitaj kontakti kun siaj parencoj en la militantaj landoj. La Centro de UEA en Ĝenevo deklaris sin preta peri la interŝanĝon de privataj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj; ĝi kolektis la korespondaĵojn ricevatajn pere de sia delegita reto, ordigis ilin laŭlande kaj laŭfakte kaj pluekspedis ilin, denove per siaj delegitoj en la diversaj landoj, al la adresitoj. La servopetoj tiamaniere ricevataj fine atingis la nombron de meze po 400 tage. Krom la perado de korespondaĵoj, la helpagado inkluzivis ankaŭ la serĉadon de personoj, sendadon de nutraĵoj, vestaĵoj kaj medikamentoj, reheimigon de infanoj kaj helpon al militkaptitoj. La nombro de servoj, kiujn plenumis centoj da delegitoj de UEA kaj deko da libervolaj helpantoj en la UEA-Centro, estis pli ol 100 000 en unu jaro.

Dum la Dua Mondmilito la internaciaj Esperanto-organizaĵoj starigis similajn servojn. Jam en 1936 estis kreita t.n. “Esperantista Interhelpo”, kiu helpis al viktimoj de la nazia teroro, precipe al judaj esperantistoj, eskapi el Germanio kaj aliaj landoj okupitaj de la nazioj. Dum la milito la perado de korespondaĵoj kaj de nutraĵoj al internigitaj personoj povis okazi el la neŭtrala Svislando nur en limigita skalo, ĉar la delegita reto ne estis tiagrade utiligebla kiel dum la Unua Mondmilito. Tamen, helpon eblis doni i.a. al internigitoj en Francio, nome al hispanaj ekzilitoj kaj judaj rifuĝintoj, kaj al la membroj de la familio Zamenhof en Pollando, antaŭ ol la eksterma politiko de la nazioj pereigis ankaŭ ilin. Post la milito la Esperanto-organizaĵoj faris valoran laboron por rekunigi disigitajn familianojn.

Notinda estas ankaŭ la informa laboro per Esperanto pri la teruroj de la milito: japanoj tradukis en Esperanton la unuajn detalajn raportaĵojn pri la suferoj de viktimoj de la atombombo en Hiroŝima kaj Nagasaki; retradukitaj el Esperanto en plurajn naciajn lingvojn, tiuj skuaj priskriboj atingis vastan legantaron en Eŭropo.

Fidela al parto de sia tradicio, la Esperanto-movado ankaŭ nun efike, kvankam ne okulfrape disponigas sin por humaneca helpo. Unuopaj esperantistoj jam delonge kunlaboras en lokaj grupoj de Amnestio Internacia, kies londona centro plurfoje agnoskis la efikecon de ilia helpo. Laŭ inciato de UEA mem dum la kulmino de la milito en Bosnio-Hercegovino estis starigita la fondaĵo “Konto Espero”, kiu unue celis subteni esperantistojn suferantajn en la militantaj regionoj de eksa Jugoslavio, sed poste ampleksigis sian helpagadon al personoj, kiuj iĝis viktimoj de milito aŭ persekuto en aliaj mondregionoj.

2.2 Eduka laboro

Nuntempe pluraj naciaj Unesko-komisionoj intense kunlaboras en la revizio de nacie uzataj instrulibroj cele la forigon de stereotipoj kaj misprezentoj de fremdaj landoj kaj popoloj. Sur tiu kampo, kiu estas aparte grava por la eduko al internaciismo, frue ekaktivis pedagogoj sciantaj kaj uzantaj Esperanton. En la 20aj jaroj francaj instruistoj iniciatis la kompilon de libro, kies celo estis senigi la instruadon de historio disde ŝovinismaj trajtoj; la materialo por tiu libro estis per Esperanto kolektita el 15 landoj. Notinda estis en pasko 1927 la konferenco “Paco per lernejo”, kiun la ĝeneva Internacia Eduka Oficejo kunvokis al Prago. La preskaŭ 500 delegitoj el 19 landoj je la fino de la konferenco, en kiu Esperanto estis uzata kiel la sola traduk-lingvo, akceptis rekomendojn pri interŝanĝo de diversnaciaj lernantoj kaj pri la senŝovinismigo de lernolibroj.

En 1957 okazis en Jugoslavio Internacia Pedagogia Seminario pri la temo “Esperanto kaj lernejo”. Tiu kunveno analizis la prezentadon de historio en diverslandaj instrulibroj; en siaj konkludoj, la ĉeestantoj pledis i.a. por pli larĝa kaj pli objektiva konsidero de ekstereŭropa historio en eŭropaj instrulibroj kaj sugestis, ke Unesko eldonu legolibrojn kun modelaj tekstoj internacie uzotajn apud naciaj lernolibroj.

En orienta Azio jam de 1982 japanaj kaj koreaj gejunuloj renkontiĝas por pridiskuti en Esperanto paŝojn al pli bona interkompreniĝo. Unu rezulto estas la eldono de libro pri la historio de Koreio, tradukita el la japana en Esperanton, kiu celas rompi tabuojn en la korea-japana rilato kaj prezenti modelon de senantaŭjuĝa traktado.

En 1955 ekaperis 15-voluma verko *Infanoj de la mondo*, publikigita de japana eldonejo, en kiu infanoj el multaj landoj skribis pri si kaj sia vivo por japanaj infanoj. Granda parto de tiuj infanaj kontribuoj, precipe por la volumoj franca, germana, skandinavia, orienteŭropa kaj sudeŭropa, estis kolektitaj dank’ al kunlaboro inter la japanaj redaktoroj kaj esperantistoj el la koncernaj landoj.

Unika iniciato venis en 1956 de svisa instruisto: li proponis kunligi klasojn de Esperanto-lernantoj per la eldono de interlerneja tutmonda gazeto, kiu entenu tekstojn en Esperanto kaj desegnaĵojn de 6- ĝis 15-jaruloj. La ideo estis favore akceptita, kaj en 1969 jam 36 klasoj el 16 landoj (*Graĵnoj en vento*) kunlaboris por eldoni trifoje jare siajn kajorojn. Tiel la instruado de Esperanto jam ĉe infanoj vekas mensan transformiĝon el regiona aŭ nacia ekskluziveco en mondan vastecon, edukante ilin al ekkono pri la “fremdo” kaj al spirito de toleremo. Samcela estas la komuna projekto “Interkulturo” de UEA kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, komencita en 1998. En 1999 tiun projekton partoprenis jam 92 lernejoj en 5 kontinentoj.

Apenaŭ necesas atentigi pri la kleriga funkcio, kiun plenumas la esperant-lingvaj revuoj aperantaj en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo. Ili publikigas regule artikolojn, kiuj klopodas plifirmigi la konscion de la legantoj pri tio, ke estas ĉies respondeco helpi en la solvado de mondaj problemoj – malarmado, lukto kontraŭ malsato, sekurigo de la homaj rajtoj, forigo de rasismo kaj de ĉiuj formoj de kultura diskriminacio. La Esperanto-revuoj ankaŭ argumentas, ke en internaciaj organizadoj kaj en interŝtataj traktadoj grandegaj monsumoj forkonsumiĝas nur por interpretado kaj tradukado – sumoj, kiuj povus esti pli taŭge elspezataj por aliaj celoj, se la organizaĵoj kaj registaroj konvinkiĝus pri Esperanto kiel efika kaj malmultekosta *solvo* de la lingvoproblemo.

UEA jam de pli ol tri jardekoj kunlaboras kun Unesko, kun kiu ĝi nuntempe havas operaciajn rilatojn. Ĝi eldonis Esperantan tradukon de la Unesko-eldonajo *Oriento kaj Okcidento – al reciproka kompreno?*. Unesko siavice eldonis en Esperanto *Rekomendo pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj*. Okaze de la 50a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis Esperantan tradukon de la gvidilo de Leah Levin, *Homaj rajtoj: Demandoj kaj respondoj*. Sub la aŭspicio de UEA aperas la prestiĝa Serio Oriento-Okcidento, en kiun eniris Esperanto-tradukoj de reprezentaj ĉefverkoj el ambaŭ hemisferoj, i.a. *Dia Komedio*, *Kalevala*, *Korano*, *Martín Fierro* kaj verkoj de i.a. Shakespeare, Baudelaire, Tagore, Kawabata, Kafka kaj García Márquez.

En 1998 ekdisvolviĝis rilatoj inter UEA kaj la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj per la komuna simpozio “Lingvo kaj homaj rajtoj”.

2.3 Universalaj Kongresoj

La ĉefaj manifestacioj de la Esperanto-movado estas la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiujn organizas UEA ĉiujare. Ili celas ne nur pridiskuti internajn aferojn de la Asocio, sed ofertas al meze 2 500 kongresanoj el la tuta mondo

ampleksan kaj varian programon – ekde sciencaj prelegoj kaj diskutrondoj ĝis teatro-prezentadoj kaj oratoraj konkursoj. La sola kongresa lingvo estas Esperanto – kaj sekve tie mankas tiu karakteriza sento de malplivaloro, kiun ofte havas kongresa delegito, kies gepatra lingvo ne apartenas al la laborlingvoj de kongreso: kiam, nome, li/ŝi estas psikologie bremsata samgrade interveni en la debatojn kiel la parolantoj, kies nacia lingvo estas “oficiala”.

Kutime, la Universalaj Kongresoj dediĉas sian laboran parton al la pridiskuto de unu ĉeftemo, ekz. “Interkompreniĝo, paco, evoluo” (Pekino, 1986), “Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado” (Brighton, 1989), “‘Ni la popoloj’: unu mondo aŭ disaj eroj?” (Tampere, 1995), “Toleremo kaj justeco en multkultura socio” (Adelaide, 1997), “Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?” (Berlin, 1999), “Lingvo kaj la kulturo de paco” (Tel Aviv, 2000). El tiuj diskutoj rezultas rezolucioj, kiuj postulas i.a., ke la registaroj akceptu la konvenciojn, kiuj rilatas al la homaj rajtoj, kaj ratifu la koncernajn paktojn, aŭ emfazas, ke “ĉiuj ajn metodoj aplikataj en edukado al internacia kompreniĝo devas aŭ resti senefikaj aŭ doni nur minimumajn rezultojn, se oni ne venkas la lingvan obstaklon kiel fundamentan baron al interhoma komunikado de la popolaj amasoj”. En la Kongreso en Berlino (1999) la prezidanto de la Asocio, Kep Enderby, ree substrekis la neceson klare kunligi la strebojn por internacia neŭtrala lingvo kun la streboj antaŭenigi la aplikon de ĉiuj homaj rajtoj tra la mondo.

Ke la kontribuo de la Kongresoj al eduko en spirito de internacieco renkontas ĉiam pli da rekono, atestas ke multaj registaroj delegas siajn oficialajn reprezentantojn al la kongresaj inaŭguroj. Mesaĝojn al la Kongresoj regule sendas la ĝenerala sekretario de UN, la ĝenerala direktoro de Unesko, kaj gvidantoj de aliaj mond-organizaĵoj.

2.4 Personaj kontaktoj

Kiel la Kongresoj, tiel same multnombraj naciaj kaj regionaj aranĝoj servas al sciantoj de Esperanto kiel forumo por renkontiĝado, interkonatiĝo kaj opini-interŝanĝo. La junulara sekcio de UEA, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), organizas regulajn seminariojn kaj feriosemajnojn por gejunuloj; ĝi starigis ankaŭ servon, kiu peras la ĉeffamilian restadinterŝanĝon en diversaj landoj. Entute, de post la milito konsiderinde kreskis la parola uzo de Esperanto: La plifaciligado de turismo pligrandigis la valoron de la lingvo kiel praktika komunikilo inter diversnacionoj el ĉiuj sociaj tavoloj, kiuj tiamaniere ofte troviĝas en privilegia pozicio kompare kun la meza turistoj. Nacilingvaj libroj, kiuj priskribas vojaĝon eksterlanden per Esperanto, dokumentante la lernprocezon estigitan per tiaj vojaĝoj, estis, ekz. en Japanio, tre sukcese disvendataj.

La multaj personaj kontaktoj, kiujn ebligas la scio de Esperanto, konsistigas la plej stabilan bazon de la Esperanto-movado. Ili restas por la parolantoj de la lingvo ankoraŭ simile inspira travivaĵo kiel tiu, kiun havis la partoprenantoj de la Unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer – kiam tie, laŭ la vortoj de Zamenhof en 1905, “kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj”. La formoj kaj enhavo de tiuj kontaktoj kompreneble tre varias; estas malfacile mezuri ilian amplekson kaj analizi ilian efikon. Ĉiuokaze, ne temas nur pri rektaj renkontiĝoj, en kiuj Esperanto estas parolata. Por multaj, la utiligo de la lingvo okazas unuavice en la formo de korespondado. Por faciligi la trovon de korespondamikoj, UEA starigis en 1958 apartan servon, Koresponda Servo Mondskala. La signifo de la opiniinterŝanĝo trans landlimojn per esperantlingvaj leteroj apenaŭ povas esti trotaksata. Nur tiu, kiu mem informiĝas ĉe esperantistoj, povas ricevi impreson pri tio, kiom da valoro kaŝiĝas en la internacia korespondado, en tiu tre intima formo de praktika apliko de Esperanto, kaj kian lernigan funkcion – en la senco de akiro de pli da kompreno por la diverseco kaj respektindeco de kulturoj – havas la korespondado. Nehazarde, cetere, esperantistoj dekomence troviĝis inter la plej viglaj uzantoj de Interreto.

Ekster oficialaj kanaloj kaj preskribitaj formoj de komunikado, ankaŭ preter la abstraktaj paroloj pri paco kaj interpopola amikeco kaj la edifaj rezolucioj pri la kontribuo de Esperanto al tutmonda solidareco, ĝuste sur la nivelo de la personaj kontaktoj reliefiĝas la konturoj de tio, kion oni povas nomi la praktikata internaciismo de la esperantistoj.

En multaj landoj tiu aktivado okazis aŭ -as nespektakle, nemulte rimarkate, eĉ kaŝe. Ĉar Esperanto disponigas sin kiel ilon de senpera internacia komunikado, ĝi emis aparte prosperi en la socialismaj landoj de orienta Eŭropo, kies reĝimoj deziris kontroli aŭ eĉ malhelpi la kontaktojn de siaj civitanoj kun la ekstera mondo. Nur post la disfalo de Soveta Unio oni eksciis detalojn pri la surpriza amplekso de agado, kiun disvolvis precipe junaj esperantistoj tie, organizante interalie grandajn tendarojn, en kiuj la anoj de diversaj naciecoj inter si uzis ne la rusan lingvon, sed Esperanton, per tio demonstrante sian ligiĝon al alternativa, certe pli aŭtentika formo de internaciismo, ol tiu, kiun postulis la Partio. Tiel ili kontribuis al subfosado de la sovetia diktaturo.

Nuntempe, post la fino de la Malvarma Milito, la Esperanto-movado dediĉas apartan atenton al la rilatoj inter la norda kaj suda hemisferoj, klopodante kunkrei rilatojn, kiuj permesu al homoj en tiuj malsamaj mondopartoj kompreni la situaciojn kaj ĉefe la pensojn de la aliaj.

3. KONKLUDO

La Preamblo de la Konstitucio de Unesko akcentas, ke militoj komenciĝas en la mensoj de la homoj kaj ke la mensoj estas la loko, kie oni devas unue konstrui la defendon de la paco. Universala Esperanto-Asocio ne nur laŭ la formale proklamitaj principoj de agado en la Statuto, sed laŭ sia tuta laboro en la praktiko faras precize tion: ĝi konstruas la bazojn de la paco en la mensoj de la homoj. Tion jam rekonis Rezolucio de Unesko de la 10a de decembro 1954, en kiu estas notitaj “la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo”. En 1985, la 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko memorigis pri la progresoj, kiujn Esperanto intertempe faris, kaj esprimis rekonon al la “grandaj eblecoj, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj”.

BIBLIOGRAFIO

- Boulton, Marjorie. *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*. La Laguna: J. Régulo, 1962. – Ankaŭ en la angla.
- Fettes, Mark kaj Suzanne Bolduc (red.). *Al lingva demokratio/Towards Linguistic Democracy/Vers la démocratie linguistique*. Rotterdam: UEA, 1998.
- Janton, Pierre. *Esperanto: lingvo, literaturo, movado*. Rotterdam: UEA, 1998. – Ankaŭ en la angla, franca, germana, hispana, itala, nederlanda kaj persa.
- Kio ni estas kaj kion ni celas. Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto*. Rotterdam: UEA, 1999.
- Lapenna, Ivo, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*. London kaj Rotterdam: UEA/CED, 1974.
- Lins, Ulrich. *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen: Bleicher, 1988. – Ankaŭ en la germana, itala, japana kaj rusa.

ULRICH LINS studis historion kaj politikan sciencon. Li estis vicprezidanto de UEA de 1989 ĝis 1995. Nuntempe li laboras en Tokio por la interŝanĝo de universitatoj inter Japanio kaj Germanio. La unua eldono de tiu ĉi dokumento aperis en 1976.

Listo de la Esperanto-Dokumentoj

N-ro	Titolo
1.	Unesko kaj UEA, 1954-1974 (elĉerpita)
2.	La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la monda paco (elĉerpita)
3.	Esperanto tra la etero, 1922-1975 (elĉerpita)
4.	Enkonduko al Esperanto-studoj (elĉerpita)
5.	Universala Esperanto-Asocio en la Internacia Jaro de la Virino 1975 (elĉerpita)
6.	Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto (elĉerpita)
7.	Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto (elĉerpita)
8.	La lingva problemoj en la Eŭropa Komunumaro (elĉerpita)
9.	Esperanto kaj la pliaĝuloj (elĉerpita)
10.	Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo? (elĉerpita)
11.	La lingvo kaj la rajto je komunikado (elĉerpita)
12.	La uzado de la internacia lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvoproblemoj en internaciaj neregistaraj organizoj: kelkaj rekomendoj (elĉerpita)
13.	La lingva problemoj de la movado de nealiancitaj landoj
14.	Rezolucioj de la 65a Universala Kongreso de Esperanto
15.	Ses esplorcentroj pri interlingvoj
16.	La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo
17.	Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado. Raporto pri la 67a Universala Kongreso de Esperanto, 1982.
18.	Lingvaj malhelpoj en rilato al la nova monda informa kaj komunika ordo
19.	Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado
20.	La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo (2a eld.)
21.	Historio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
22.	La lingva problemoj en turismo
23.	La soci-politika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto
24.	La lingva problemoj en scienco kaj la rolo de la internacia lingvo
25.	Esperanto – lingvo de la natursciencoj kaj tekniko
26.	Psikologiaj reagoj al Esperanto
27.	Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo
28-29.	Al nova internacia lingvopolitiko: La propedeŭtika valoro de Esperanto
30.	Perkomputila tradukado: La revo kaj la realo
31.	Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko: Intervjuo kun la franca lingvisto André Martinet
32.	Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo: Diskuto kun Umberto Eco
33.	Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo
34.	Por politiko de Esperanto
35.	Ĉiuj kune: Aktoj de la 1-a Kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo

Pluraj el la ĉi-supre menciitaj broŝuroj haveblas ankaŭ en la franca kaj angla lingvoj.

La ideo de paco kaj solidareco inter la homoj akompanas Esperanton ekde ĝia naskiĝo. Por tiu ideo aktivas dekomence ankaŭ UEA, la reprezenta organizaĵo de la esperantistaro. Ĝia fondinto Hector Hodler vidis la sorton de Esperanto "intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia" kaj tial postulis de la membroj de UEA aktivan lukton kontraŭ la "interŝtata anarkio".

En tiu ĉi kajero d-ro Ulrich Lins bildigas la kontribuon de UEA tra jardekoj al la akcelo de la monda paco kaj interproksimigo de la popoloj.

Sur la kovrilo

Esperanto-klaso en Prago, 1974